Estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaŭdon la 15-an de marto 2018 per Skype

Partoprenis:

Mario Machlik en Tromsø
Ulf Lunde en Os
Jardar E Abrahamsen en Trondheim
Amelie Matt en Tromsø

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la interkonsiliĝo la 25-an de januaro

Aprobita.

2. Ekonomio

Pro foresto de la kasisto ni transsaltis tiun punkton en la tagordo.

3. Jarraporto, jarkalkulo 2017

Ĉiuj partoprenantoj de la interkonsiliĝo kune redaktis la dokumenton per Google Docs.

4. Skandinava kongreso 10a -13a de majo 2018

http://esperantonordio.org/index.php/nb/ havas informojn en la norvega pri la kongreso.

Mario Machlik kontaktis la urbestron de Oslo kaj ricevis pozitivan respondon: La urbestra oficejo invitis la Skandinavan kongreson al renkontiĝo kun la urbestro kaj 45-minuta ĉiĉeronado en la urbodomo. NEL akceptis la inviton nome de la kongreso.

5. Komitatano A de UEA

Ĝis nun la estraro ne ricevis respondon de nia unua proponito, Herman Ranes. Se li ne akceptos la postenon, la estraro volas demandi Kjell Peder Hoff.

6. Nepagintaj membroj

Estas multekoste sendi memorigilojn per poŝto. Tial estus bone se NEL havus la telefonnumerojn aŭ retpoŝtadresojn de siaj membroj.

7. Eventualaĵoj

Anne Karin Bondhus aplaŭdinde transigis la membroregistron (de MicroSoft Access 2003) al senkosta datumbaza sistemo.

Por Heming ĵaŭdoj (kaj merkredoj) malbone taŭgas por interkonsiliĝi. Por aliaj estraranoj mardoj kaj vendredoj ne taŭgas. Ni dume ne ŝanĝas niajn kunvenplanojn, sed ekde ma aŭtuno ni klopodu trovi pli oportunan tagon de la semajno por niaj interkonsiliĝoj.

La interkonsiliĝo daŭris de 20.00h ĝis 21.25h.

La venonta: La 26an de aprilo. Amelie antaŭavertas ke ŝi devos labori tiun vesperon.

Raportis Ulf Lunde.